

## LECIONO 18

### Gramatiko



### Tabeloj de konjunktioj kaj subjuktioj, interjektioj kaj partikuloj

(Таблица сочинительных и подчинительных союзов, междометий и частиц)

ankaŭ – тоже; также	kvankam – хотя	ĉu - ĉu – либо-либо, будь-будь
ankoraŭ – ещё	kvazaŭ – будто	jen - jen – то-то
aŭ – или	aŭ...aŭ – или...или	ju - des – чем-тем
ĉar – потому что	ĝis – до; до тех пор, пока	kaj - kaj – и-и
do – ну; итак; следовательно	tamen – однако; всё-таки	nek - nek – ни-ни
dum – в то время как	sed – а; но	ne nur ..., sed ankaŭ – не только ..., а также
kaj – и	se – если	
ke – что, чтобы	nek – ни	


aĥa – ага! ах! а! у! ба! ха!	ehe! – эхехе!	halo! ha lo! – алло!
aĥem, hm – хм, гм!	ek! – давай!	hola! – эй! алло!
aĥ! – ах! увы!	fi! – тьфу	ĥop! – гоп!
adiaŭ – прощай!	ha ha! – ха! ха-ха-ха!	huŝ! – кш! кыш!
aj! – ай! ой!	halt! – стой!	hura! – ура!
ba! – ба!	he – эй!	nu! – ну!
baj...baj – бай-бай	help! – на помощь!	oho! – ого!
bis! – бис!	hi hi – хи-хи!	stop! – стоп!
ĉit! ŝŝ! ts! – тсс!	ho! – о! ох!	ve – увы! ой-ой-ой!

ĉu – разве, ли	ja – ведь, же	jes – да
eĉ – даже	jen – вот	ne – нет, не
		po – по

### Tabelo de prepozicioj (Таблица предлогов)

lokaĵ	tempaĵ	ceteraĵ
antaŭ	antaŭ	
apud		
al		
ĉe		
ĉirkaŭ	ĉirkaŭ	da
de	de	de

ekster	dum	je
el		krom
ĝis	ĝis	kun
inter	inter	laŭ
kontraŭ	post	malgraŭ
post		per
laŭ		por
sub		pri
super		pro
sur		sen
tra		
trans		



### Kunmetitaj prepozicioj (Составные предлоги)

prefikso + prepozicio	disde, ekde
prepozicio + prepozicio	de sub, de antaŭ, de post, de sur, el inter, el trans, ktp.
prepozicio + tempadverbo	de kiam, de tiam, de nun, ĝis kiam, ktp.
- e + al	proksime al, responde al, rilate al, vidalvide al, ktp.
- e + de	dekstre de, maldekstre de, norde de, sude de, escepte de, helpe de, kaŭze de, komence de, meze de, okaze de, malproksime de, sekve de, najbare de, ktp.
- e + kun	kune kun, kompare kun, interkonsentite kun, ktp.

**I. Difinu la signifon de sekvaj vortoj:** antikva, aŭtobuso, bileto, centro, ekskurso, funkcii, hotelo, ĵongli, komforta, kvalito, nacio, originala, ornami, paro, reklami, rekomendi, rekompenci, sezono, spektaklo, turisto.




**II. Tralegu la tekston «Nepre vizitinda» kaj diru, kiujn novajn scipovojn akiris Miĉjo.**

### **Nepre vizitinda** (Reklampaĝo en turisma revuo)

por eksterlandaj turistoj estas urbeto en la centra Rusio, ne tro for de la ĉefurbo. Ni rekomendas al ĉiu gasto ekskursi tien per aŭtobuso. Egale konvenos por tio iu ajn sezono. La antikvaj preĝejoj, kampaniloj, ornamitaj lignaj dometoj estas logaj same inter profunda blanka neĝo, florantaj pomarboj, verda aŭ flavruĝa foliaro. Vi ĝuos ĉi tie provincan silenton kaj elstaran rusan kuirarton. La komforta hotelo «Mammouth» kun du- kaj unulitaj apartamentoj estas atinginta tristelan kvaliton.

Sed la plej memorinda festo, certe, iĝos por vi la vizito en la urban parkon. Tie atendas vin la unika paro da animaloj – la prahistoria mamuto Miĉjo kaj la ĉarma hinda elefantino Manjo. Ne dubu, aĉetante la biletojn, ĉar la ridindan prezon rekompencos vera plezuro.

Ĉe la suna vetero la paro libere promenas inter plantaĵoj; en okazo de pluvo, neĝo aŭ tro forta frosto ili restas en varma ejo. Tiel aŭ aliel la mastroj proponos al vi neforgeseblan spektaklon. Miĉjo kaj Manjo estas ŝercemaj spertaj artistoj. Ili bone regas arnumerojn por amuzi vin. Vi certe miros, kiam vi ekvidos propraokule, ke Miĉjo kapablas kalkuli, konas aritmetikon kaj eĉ skribas multajn vortojn per kredo sur nigra tabulo. La miraklon vi povas vidi nur ĉi tie! La originala paro allogas amason da homoj de multaj lingvoj kaj nacioj. Tamen oportuna horaro permesas eviti vicojn ĉe kiom ajn granda kvanto da vizitantoj.



Miĉjo kaj Manjo

Dum ekskurso en la parko vi devas obei nur tri postulojn – ne fumi, ne drinki kaj ne kunporti armilojn.

Originalajn bildojn de lokaj pentristoj, suvenirojn, librojn, insignojn kaj poŝtmarkojn vi povas aĉeti en la butikoj, kiuj funkcias en la parko kaj en hotelo.

Bonvenon al ni dum via ferio. Miĉjo kaj Manjo atendas vin!

**III. Trovu la komencon kaj la finon de la sekvaj partoj de la teksto.**

Provinca urbeto en la centra Rusio. Nepre vizitinda urba parko. Neforgesebla spektaklo de spertaj artistoj. Obeendaj postuloj. Ebla butikumado.

**IV. Jen estas la respondoj. Faru la demandojn.**

La urbeto, kie loĝas Miĉjo, troviĝas en la centra Rusio. Tien eblas ekskursi per aŭtobuso. Multaj antikvaj vidindaĵoj logas la eksterlandajn turistojn al la urbeto ajnasezone. En provinco ili ĝuos silenton kaj elstaran rusan kuirarton. La komforta hotelo «Mammouth» estas atinginta tristelan kvaliton.



### **V. Respondu al la demandoj de la dua parto de la teksto.**

Kie promenas la paro ĉe la suna vetero? Kie ili restas en okazo de pluvo? Kian spektaklon proponos al vi la mastroj? Kiaj artistoj estas Miĉjo kaj Manjo? Pri kio miras la vizitantoj ekvidinte ilin? Kiuj homoj venas en la urban parkon? Kiom multas la vizitantoj? Kio permesas eviti vicojn?

**VI. Relegu la obeendajn postulojn dum ekskurso en la parko kaj diru,** kiujn postulojn vi povus aldoni por la vizitantojn de ĉi parko? kiujn postulojn nepras obei vizitante iun teatron, kinejon? ekspozicion? lernejon, universitaton, laborejon? seriozan kunvenon? junularan dancejon?

### **VII. Traduku en Esperanton uzante la adverbon – ajn.**

Мои родители желают, чтобы я отдохнул сколько-нибудь. Зачем он уедет отсюда, где у него есть возможности сколько-нибудь заработать? Ребёнок радуется матери больше, чем кому-либо. Мы справимся с нашей проблемой без чьей-либо помощи. Эта карта может запутать всякого. Зная Эсперанто, легче изучить любой национальный язык. Опытные эсперантисты хорошо понимают друг друга, к какой бы нации они не принадлежали. Что бы я не сказал, всё кажется правдой. Как бы они не хитрили, они будут пойманы. Куда бы моряки не смотрели, они видели лишь воду и небо. Какую бы цену Вам не предложили, не продавайте свой дом. Сколько бы не длилась ночь, всё равно наступает новый день.

**VIII. Metu en la spacojn sekvajn verbojn:** drinki, fumi, ĝui, konveni, obei, pentri, postuli, preĝi, regi, serĉi.

La fraŭlino kapricis dirante, ke la koloro de la aŭto ne \_\_\_as al koloro de ŝia robo. Ju pli oni \_\_\_os, des pli malmulte oni ricevos. Post aĉa vetero en centra Rusio ni \_\_\_is varmon de la Krimea marbordo. Ĉiu infano devas \_\_\_i siajn gepatrojn. Dum katolika meso oni multe \_\_\_as kaj kantas psalmojn. La policianoj traserĉis la tutan domon: nun tie \_\_\_as malordo. «Mi nek \_\_\_as kaj nek \_\_\_as, nek knabinojn amindumas», – diris maljuna fraŭlo. Multaj junaj kaj talentaj estontaj Pikaso-j kaj Van Gog-oj sidas kun penikoj kaj farboj kaj \_\_\_as pejzaĝojn. Kiu \_\_\_as, tiu trovas.

### **IX. Tradukante en Esperanton atentu la vortojn en kursivo.**

Мы провели свой *отпуск* за городом. *Значок* эсперантистов – зеленая пятиконечная звезда на белом фоне. Эсперанто – международный *язык*, созданный польским врачом Л. Заменгофом. Мебель была сделана хозяином дома: стол, стулья, *кровать*, полки. Минувшей зимой на улицах было много *снега*. До позднего вечера во дворе дети играют в *мяч*. Журнал «Волна Эсперанто» издаётся в России. Чтобы купить билеты на новый спектакль в драматический театр, они долго стояли в *очереди*. В *солнечную и тёплую погоду* идут гулять в парки и сады, сидят на скамейках в скверах и аллеях. Необычная *тишина* царила на уроке математики.

## ***X. Traduku la esprimojn kaj kompilu frazojn kun kelkaj el ili:***

глубокая тарелка, глубокая осень, глубокий траур, глубокая старость, глубоко укоренившийся, в глубокой древности, глубокое изучение, глубокая ночь, глубокий мрак, в глубине души, глубокомысленный



## ***XI. Tralegu fragmenton el la rakonto de rusedvena usonano Boris Kolker kaj diru, kion «reklamas» la aŭtoro.***

### **Lando, kiu ne estas sur la mapo**

La lando Esperantujo. Ne serĉadu tiun landon sur la mapo – ĝin ne notis la ĉiosciantaj geografoj. Kaj tamen Esperantujo ekzistas – ĝi etendiĝas sur la tuta terglobo, ĝin enloĝas homoj de ĉiuj sociaj tavoloj – laboristoj kaj ŝtatestroj, lernejanoj kaj akademianoj; homoj de ĉiuj aĝoj – de balbutantaj beboj ĝis centjaraj maljunuloj; homoj de ĉiuj nacioj kaj haŭtkoloroj; homoj de ĉiuj profesioj, okupiĝoj, hobiaj, interesoj, temperamentoj. Esperantujo estas mondo en miniaturo. Tra la prismo de Esperantujo estas pli facile ĉirkaŭrigardi kaj kompreni la mondon.

Kio do unuigas la homojn en Esperantujo? Unue – la aspiro fortikigi la pacon kaj interkompreniĝon inter la popoloj. Due – la internacia lingvo Esperanto, kiu heredis ĉion plej bonan, logikan, esprimkapablan, kio ekzistas en naciaj lingvoj. Malgraŭ tio, ke esperantujanoj loĝas en Arktiko kaj en la tropikoj, sur montoj kaj sur Pacifikaj insuloj, sur ĉiuj kontinentoj, ili bonege komprenas unu la alian pro la admirinda unueco de la lingvo. Se en esperantlingvaj revuoj ne staras subskriboj sub artikoloj, oni ne kapablas difini laŭ la stilo, en kiuj landoj loĝas ties aŭtoroj.



terglobo

Centmiloj da esperantujanoj legas en la Internacia lingvo beletrajn, soci-politikajn, scienc-teknikajn librojn, centon da revuoj, filmojn, korespondas, kantas, parolas dum kongresoj kaj renkontiĝoj, en tendaroj kaj kluboj. Esperanto estas ne simple lingvo, sed ankaŭ rimedo de pacbatalo, ĝi estas romantiko, ĝi estas interesa kaj utila ŝatokupo....

...La romantika, mirakla simbola lando Esperantujo vokas vin transiri ĝian sojlon. Ankaŭ por vi, nova esperantujano, restas en ĝi multe da diversa grava, utila, interesa kaj agrabla laboro, ĉar, laŭ la jura formulo, permesita estas ĉio, kion ne malpermesas la leĝo. Estu konscia, klera kaj iniciatema esperantisto!

*1. Respondu al la demandoj.* Kiu ne notis la landon Esperantujo sur la mapo? Kie etendiĝas Esperantujo? Kiu ĝin enloĝas? Kio estas Esperantujo? Kio eblas tra la prismo de Esperantujo? Kio unuavice unuigas la homojn en Esperantujo? Kion heredis Esperanto el naciaj lingvoj? Pro kio esperantujanoj bonege komprenas unu la alian? Kion ebligas la Internacia lingvo? Ĉu Esperanto estas profesio aŭ ŝatokupo? Kia laboro atendas ajnan novan esperantujanon?

2. Kio en la «reklamita» Esperantujo kaj ĝia lingvo allogas vin?

3. Kompilu la reklampaĝon de via laborloko (lernejo, universitato, klubo) laŭ jenaj helpvortoj:

rekomendi – situi – konveni;

labori – studi – loĝi;

konstruaĵo – urboparto – trafikiloj;

horaro – laboro (studado) – labor(stud)ĉambro;

ĉefo (dekano) – gekolegoj (gestudentoj) – interrilatoj;

konferencoj – scienca tezo – premio (stupendio);

manĝejo – biblioteko – sporta halo – naĝejo;

ferio – banloko – eksterlanda vojaĝo.



## XII. Ni kantu «Ne, ne, ne», E-teksto de D.Lukjanec.

1. Voĉlegu la tekston de la kanto kaj traduku ĝin helpe de vortaro.

2. Klarigu ĉiujn gramatikaĵojn.

3. Parkerigu la tekston de la kanto.

### Ne, ne, ne

Muziko de Manuel

Refreno: Ne, ne, ne ni veturas tuj

Al la land' Esperantuj',  
Ĉar kunvenas post longa jar'  
En la arbaro amikar'.

Estos bonega renkontiĝ',  
Tondros la kantoj ĝis aŭror'.  
Tie okazos renaskiĝ'  
De niaj fortoj kaj humor'.

Refreno:

Nin ne timigas longa voj',  
Estas malplena la monuj',  
En ĉiu jar' po unu foj'  
Logas nin land' Esperantuj'.

Refreno:

Oni parolas: «pro agad'  
Mi vagabondas por ĉiam'» –  
Tiel postulas la movad',  
Mia esper' kaj mia am'.

Refreno:



malplena monujo



*Refreno*  
Bm (F7) Bm

Ne, ne, ne, mi ve - tu - ros tuj al la land' Es -

E<sup>b</sup>m Bm

pe - ran - tuj', ĉar kun - ve - nos post lon - ga jar'

F7 Bm ⊕ Bm

en la ar - ba - ro a - mi - kar'. 1. Es - tos bo - ne - ga

Bm<sup>7</sup>

ren - kon - tiĝ', ton - dros la kan - toj ĝis aŭ - ror',

E<sup>b</sup>m F7

ti - e o - ka - zos re - nas - kiĝ' de mi - aj for - toj

FINO  
Pli silenteme  
⊕ Bm

kaj hu - mor'... // Ĉar kun - ve - nos post

Bm F7 Bm

lon - ga jar' en la ar - ba - ro a - mi - kar'.

## Ŝlosiloj al la taskoj

### *Tasko VII*

Miaj gepatroj deziras, ke mi ripozu iom ajn. Por kio li forveturos de tie ĉi, kie li havas eblecojn iom ajn perlabori. Infano pli ĝojas al patrino, ol al iu ajn. Ni solvos nian problemon sen ies ajn helpo. Tiu ĉi mapo povas konfuzi iun ajn. Scipovante Esperanton estas pli facile ellerni ĉiun ajn nacian lingvon. Al iu ajn nacio ili apartenu, spertaj esperantistoj tre bone komprenas unu la alian. Ion ajn mi diru, ĉio ŝajnas vero. Iel ajn ili ruzu, ili tutegale estos kaptotaj. Ien ajn maristoj rigardu, ili vidis nur akvon kaj ĉielon. Iun ajn prezon oni al Vi proponu, ne vendu vian domon. Iom ajn daŭru nokto, tutegale venos nova tago.

### *Tasko VIII*

La fraŭlino kapricis dirante, ke la koloro de la aŭto ne konvenas al koloro de ŝia robo. Ju pli oni postulos, des pli malmulte oni ricevos. Post aĉa vetero en centra Rusio ni ĝuis varmon de la Krimea marbordo. Ĉiu infano devas obei siajn gepatrojn. Dum

katolika meso oni multe preĝas kaj kantas psalmojn. La policianoj traserĉis la tutan domon: nun tie regas malordo. «Mi nek drinkas kaj nek fumas, nek knabinojn amindumas», – diris maljuna fraŭlo. Multaj junaj kaj talentaj estontaj Pikaso-j kaj Van Gog-oj sidas kun penikoj kaj farboj kaj pentras pejzaĝojn. Kiu serĉas, tiu trovas.

### *Tasko IX*

Ni pasigis nian *libertempon* eksterurbe. La *insigno* de esperantistoj estas verda stelo sur blanka fono. Esperanto estas internacia *lingvo*, kreita de pola kuracisto L.Zamenhof. Meblaro estis farita de dommastro: tablo, seĝoj, *lito*, bretoj. Pasintan vintron estis multe da *neĝo* surstrate. Ĝis malfrua vespero infanoj ludas *pilkon* en korto. La *revuo* «Ondo de Esperanto» estas eldonata en Rusio. Por aĉeti biletojn por nova spektaklo en drama teatro ili longe staris en *vico*. Dum *suna* kaj *varma vetero* oni iras promeni en parkoj kaj ĝardenoj, oni sidas sur benkoj en skvaroj kaj aleoj. Neordinara *silento* regis dum leciono pri matematiko.

### *Tasko X*

глубокая тарелка – *suptelero*, глубокая осень – *fino de la aŭtuno*, глубокий траур – *granda funebro*, глубокая старость – *tre maljuna aĝo*, глубоко укоренившийся – *enradikiĝinta*, в глубокой древности – *en praeroko*, глубокое изучение – *ĝisfunda studado*, глубокая ночь – *malfrua nokto*, глубокий мрак – *plena mallumo*, в глубине души – *en profundo de l'animo*, глубокомысленный – *profundpens(em)a* (*profundsenca*)